# Hungaraj libroj hodiaŭ survojis al Bulgario

Kadre de serio de laborkunvenoj inter la bulgaraj esperantistoj kaj la vicprezidanto de UEA, naskiĝas ankaŭ klopodoj fortigi la kontaktojn inter la Landaj Asocioj de Centra Eŭropo kaj la balkana regiono – tiuj venas el simila fono kaj spertas similajn malfacilaĵojn, kiujn ili pli bone superos kune ol dise. Kiel indiko de bonvolo, la Hungaria Esperanto-Asocio kaj ILEI donacas al la bibliotekoj de la Buglara Esperanto-Asocio kaj la tiulanda ILEI-grupo dudekon da literature valoraj hungariaj titoloj resp. cellingvaj instruiloj, la plimulto en du aŭ pli da ekzempleroj. Diskutoj sekvos pri ebloj de iaj komunaj renkontiĝoj, unuavice inter Bulgario, Hungario kaj Rumanio, sed ĉiam kun eblo pri enplekto de pliaj landoj en la regiono.

Aliaj temoj dum la diskutoj estos pritaksi la kontribuon, kiun povus fari UEA al la bulgara movado, kaj aliflanke la fortoj, kiujn Bulgario povos kontribui al UEA. Inform-arigo estos granda parto de la vizito, kiu havas sian kuntekston en la planoj rikolti sistemigitajn raportojn de ĉiuj landaj asocioj; kun pli da rimedoj tiu plano progresus malpli helike.

Flanka vizito de Stefan MacGill al Veliko Tirnovo (karmemora pro la IJK en 1978) celas esplori eblojn transformi la enlandan ILEI-grupon al plenrajta sekcio de ILEI. En Montevideo, ILEI jam havas tri aliĝpetojn por trakti, ni nun provas baki la kvaran.

Progresraportoj sekvos; la ĉefa laborkunsido okazos dimanĉe en la bulgara ĉefurbo, Sofio, en la sidejo de BEA, kun reprezentantoj el diversaj urboj de la lando.

SMG: Flughaveno de Beogrado / Sofio, 26an de junio, 2014
LA cirk 2014-06-27 BG Libroj el HU.doc. Vortoj: 255

Sekvas fotoj el la agrabla kaj utila vizito al Veliko Tirnovo kaj poste (sube) Polski Trambesh. Sube maldekstre: vesperaj babiloj kun veterana esperantisto en tiu urbo: kie alie tranokti ol en Hotelo Esperanto? Fotoj de Mariana Genĉeva.










Ne kunportanta mem fotilon al renkontiĝoj, mi riskas aperi sur la fotoj, kiujn faras aliaj. Pardonu! Mi promesas ekde baldaŭ havi propran fotilon (eĉ ciferecan!), tiel ke vi ne suferu tiun sorton, almenaŭ en la fotoj, kiujn mi mem faris.